Tuboj

Cindy Moon McKee

Ekpaŝo



La sportŝuo SPIRA. Aŭ mi devos peti permeson, aŭ forigi la bildon

La infano rifuzis antaŭeniri, spite la ĉiam pli kaj pli laŭtajn insistojn de la patrino. Elena klinis sin flanken, ĝis ŝi ekvidis la kialon. La brak-ekrano de iu en la vico montris bildon de akvario kun flirtantaj, buntaj fiŝoj. La knabo fikse rigardis la fiŝojn. Elena ridetis, amuzita. *Post plia sekundo, la patrino trenos la bubon je la mano*. Tamen, la ino gestis super sia brako kaj preskaŭ tuj, la etulo eksaltis: HO!
"Nu, fek," pensis Elena, "kial ŝi devis vibrigi la

tatuaĵon de la filo, por tiel konsterni lin? Kial ne preni lin je la mano?"
La paro malaperis en la tubtrajnon.
Post propra eniro kaj trovo de sidloko, Elena kontrolis la ŝargon restantan al la akumulatoro. Bone; la promeno al la tubo aldonis multan energion. Tuj ŝi sendis rideton al Abha. Li respondis post sekundoj per petola tatu-tuŝo al tatuaĵo konata nur al li.
La lampoj en la trajno duonlumiĝis. Elena provis surfundiĝi en la seĝon; ŝi altiris la kubutojn for de la flankaj kunpasaĝeroj kaj malfermis novelon.
Post nelonge, la trajno malrapidiĝis por komenci la finan etapon. Bone! La novelo estis mallerta klopodo aŭguri vivkondiĉojn post kelkaj jaroj. Oj.
Kiam la lampoj plenlumiĝis, ĉiuj pretigis sin por la halto. Fine, Elena povis preni la valizon kaj elsalti. Ŝi ĉirkaŭrigardis, vidis dancantajn buklojn kaj tuj iris al la ĉiam moviĝema Zoe.
Zoe entuziasme brakumis Elena kaj klaĉinformis pri ĉiuj personoj kaj okazoj rilate la kunvenon. Zoe ja mem alvenis antaŭ 2 plenaj tagnoktoj. :)
Kiam ili eliris el buso antaŭ hotelo, Elena fine respondis al la mesaĝoj de Abha. Ŝi ne komprenis la heziton paroli kun Abha kiam Zoe kunestis. Zoe nur ridete atendis, ĝentile restante silenta kaj turnante la vizaĝon al la suno. Kiam Elena ĝisis Abha, ili eniris la hotelon.
Ĉi tie en Teksaso, valuto restas la samo tra la tuta ŝtato, do sekvamatene Elena interŝanĝis bitmonerojn

ĝis ricevo de sufiĉaj teksbiletoj por pluraj tagoj. Ŝi kaj Zoe prezentos antaŭ aŭdantaro plurspace en la ŝtato. Kelkaj aliaj spacoj en eksUsono ne posedas propran valuton kaj kverelas pri akceptindaj monoj.
La kontoristo lasis fali la brakon de Elena. Finfine. Teksasanoj estas tuŝemaj, ĉu ne? Elena iritiĝis.
Gestante super sia brakekrano, ŝi reludis la transakcion, ŝaltante parolon. Kiam la aŭtomato silentis, ŝi diris al la kontoristo, “Vidu kiel glite-glate *gestoj* efikas!”
Li levis la ŝultrojn.
Nu, Paŝenergio ne pagas min stari. Ŝi paŝis.
Ekstere vento blovis. Kiam Elena estis eta ŝi legis en iu nun forgesita libro, ke dio estas en la vento. Ekde tiam, ŝi atentis blovojn. Fajfanta inter homfaritaj aĵoj, la vento ĉiam ŝajnis nur vento. Sed foje de inter la folioj de arboj, Elena kaptis senton...iun senton.
Staris proksima arbo en la verdostrio apud la trotuaro. Elena revenis en la hotelon, trovis la grizan akvon, tiun kaptitan defluaĵon de banoj, prenis sitelon, plenigis ĝin kaj akvumis la arbon.
Arboj devas esti flegitaj, de ĉiu.
Ek al la kunvenejo!
La parolo estis ricevita entuziasme, eble ĉar Zoe, la kunordiganto, kuris sur la podio en ŝuoj kiuj postlasis aperon de polvo-flokoj ĉiupaŝe. Ĉiuj aplaŭdis dum Zoe klaŭnis.
Elena kaŝis domaĝan grimacon. La plandumoj estas dezajnitaj ŝargi vin. Tiu fum-efekto devas eluzi iom da ŝargo. Por konkurenci kontraŭ aliaj formoj de

ŝargiloj, la firmao ne kuraĝigu rapidan eluzon de la ŝargo.
Ŝi tamen, ridetis al la aŭdantaro, diris ĉiujn decajn dankojn al la gastigantoj de la kunveno kaj adiaŭe kuris malantaŭe Zoe du rondirojn sur la podio kaj al la elirejo.
Poste, ili manĝis kun estro de aĉet-koopero. Inter buŝplenoj da fazeoloj, ili priparolis la kapdolorojn koncerne transporton de varoj. Preskaŭ neniu en la ekspeda industrio kapablas lerte marĉandi kun ĉiuj diversaj spacaj stacioj. La tubtrajnoj estas nur por pasaĝeroj, laŭ granda interkonsento.
La estro de la koopero demandis pri la plano de Paŝenergio printigi plandumojn per 3d-printiloj. Tio forigus la problemon de transporto de la fabrikoj al varejoj al vendejoj. Elena kaj Zoe devis konfesi ke multaj testitaj 3d-printiloj, kvankam ili ĝuste legas la instrukciojn, ne estas disponigitaj je taŭgaj materialoj.
Ted, la koopero-estro, tuj sentis bezonon venigi ilin al la biblioteko, por montri la mirindaĵojn de la 3d-printilo posedita de tiu komunumo. Elena prenis la restantajn bulkojn de sur la tablo, ĵetis unu al Zoe, kiu sukcese kaptis ĝin kaj ambaŭ enpoŝigis tiujn bongustaĵojn.
La komunuma biblioteko estis impona. La inoj gapis je la skulptaĵoj dum ili iris al la ĉambro kiu enhavas la printilon. Antaŭ vitra muro kaosis tropikaj verdaĵoj. Elena sciis, ke ili utilas en la kapto de volatilaj kemiaĵoj de la aero. Ŝi staris kaj admiris la

belecon de la folioj dum Ted funkciigis la printilon. Tavolon post tavolo aĵoj estiĝis. Fine, Ted muntis partojn kaj montris la kompletan umon. Ĝi estis gumeca kaj spiralforma. Kiam tuŝita, fadeno aperis kaj suprenrampis la spiralon.
“Ĝi estas por mia kato”, li klarigis. “Ŝi ĝuos ĉasi la fadenon. Mi nur esperas ke ŝi frapos la ludilon. Ĉu estus bona ideo ŝmiri ĝin per manĝaĵo, por allogi ŝin veni kaj ludi?”
Zoe ridis kaj diris, “Ho, vi estas patro de kato! Ĉarme! Ĉu ŝi havas katidojn?”
Pensis Elena, *Mi estas ĉirkaŭita de idiotoj*, sed ŝi tuj pentis.
Ted montris filmojn de tre bela kato; ili sincere aaa-is kaj ooo-is. Elena kaptis ekrankopion kaj sendis ĝin al Abha. Poste ili dankis Ted kaj revenis al la hotelo.
Survoje, Elena komentis, ke se Ted ŝaltus hejman kameraon kaj invitus al kunparolo kun sia kato, ŝi ne sentus surprizon. Zoe respondis, tute serioze, ke la kato probable dormas.
En la hotelo, ili montris atestilojn pri kono de kultivado. La bona afero pri hoteloj estas ofta posedo de propra legomĝardeno. La gastoj kiuj posedas tian atestilon rajtas labori en la ĝardeno. Tiuj sen atestilo ne estas permesitaj, ĉar ili eble detruus pliajn plantojn ol ili helpus.
Elena kaj Zoe ekscite prenis sarkilojn kaj hastis al la ĝardeno.
“Je Jupitero, mi amas la odoron de grundo!” Zoe kriis dum ŝi skrapis la grundon.

“Jupitero estas planedo *gasa*”, respondis Elena. “Nu, mi sentas samon. Mi adoras la odoron!”
Krepuskis tro frue. Grumblante, ili forlasis paradizon kaj iris al dormoĉambroj. Iu okupis la proksiman duŝejon, do Elena ree portis la vestoŝanĝon al la dormoĉambro kaj beligis sin kiel eble plej bone por la rendevuo kun Abha. Kiam li aperis, li ŝerce nomis ŝin bela kato kaj glatumis ŝin per tatutuŝoj. Ili ridis kaj parolis dum horoj. Duŝo forgesita, Elena endormiĝis, febla lumo eliranta el la brako.

Ekflugo



La teksasa turneo finiĝis. Kelkaj personoj menciis, ke ekzistas trotuaroj kiuj kapablas ŝargi vin kiam vi surpromenas. Tiaj kontraŭoj ĝenis. Paŝenergio kredas, ke la sendependa kaj memdependa maniero estas la sola fidinda ŝarga maniero en tiel senordaj

tempoj. Malofte homoj konsentas pagi imposton al ŝanceliĝema komunuma konsilio. Nenecesaj projektoj kiuj postulas altan financadon kutime estas rifuzitaj.
Ho, por la Granda Reto mem – sendube, subteno estas nepra! Sed, kiel ĉiu scias, la plej populara uzo de 3d-printiloj estas la printado de piloj. Tiel longe kiel homoj povas ŝargi sin, ili ne konsentos kunfinanci komunuman projekton rilate ŝargadon.
Elena malridetis. Ŝi staris je fenestro en atendejo. Ekstere, la Golfo de Meksiko trembrilis. Post kelkaj minutoj, iu venos por konduki la pasaĝerojn sur tiun akvon kaj al la spactubo. La trako suferis damaĝon pro uragano, malgraŭ la flekseblaj pilieroj, malgraŭ la kolapsebla strukturo. Ĝi ja vere kolapsis. Sed sur la strandon.
Nervoze, Elena konsideris la probablecon ke la tiel nomataj riparoj efektive estis nur flikoj.
Ŝi sentis solecon. Ne bonas morti sola. *Ĉu mi volas ke amiko estu kun mi, por morti ankaŭ?* Ŝi turnis la atenton al la celo de la vojaĝo, Abha. Dolĉa kiel sukerkuko, petola kiel infano, serioza kiel saĝulo. Kaj je la fino de la vojaĝo, varma korpo!
Tiu penso estis tro intensa. Ŝi turnis la kapon por rigardi la ĉambron.
La ceteraj pasaĝeroj sidis kaj babilis. Kiel ĉiam, ne kun la samĉambranoj. Ili okupis malsamajn lokojn en la Reto. Senkorpaj voĉoj flosis el tiuj lokoj por aldoni al la ĉambra bruo.
La oreloj de Elena estis tro sentemaj al bruo. Ĝuste

kiam Elena komencis freneziĝi, la gvidanto aperis. Li petis malŝalton de ciuj komunikiloj, rapide skizis la enŝipiĝajn procedurojn, ktp. Kiam ĉiu kapjesis komprenon, li kondukis la pasaĝerojn mallongan distancon al la platformo.
La spacavio havis nur sufiĉan spacon por teni ĝuste tiun nombron da pasaĝeroj. Sidlokoj ŝajnis esti la solaj objektoj en la kajuto. La avio moviĝis, glitis sur la tubo. Kiam ĝi atingis la supron de la kurbo, la avio estis ĵetita ĉielen, kun la kargo de dense pakitaj homoj. Klostrofobio levis sian monstran kapon. Aŭdeblis ĝemoj. Feliĉe kaj save, la fenestroj pleniĝis de panoramo. Enorma ronda sekcio de la terglobo kaptis ĉies atenton. Post minutoj da fascina rigardo, ili facile kaj senĝene interbabilis. Iu rerakontis la ŝercon pri la morto el la alfabeto de la litero **Ĥ** pro tiu terura tuso. Ĉiuj denove ĝemis.
Tempo pasis ne malbone. Rapide, tiu lando nomita Utarpradeŝo ricevis vizitantojn el la supra atmosfero. Neniu kontrolo atendis Elena, nur Abha, kun brakoj etenditaj. Ŝi kuris al varmaj brakumoj.
Ili eniris la urbon Kanpuro, dum Abha informis pri siaj ĉiĉeronaj intencoj.
“Ni volas viziti la lokon kie estis verkita la Ramajanon, ni volas...”
“Hej!” interrompis Elena. “Ni ne havos tempon turismi. Ni estos tro okupitaj.”
Ŝi palpebrumis ĝis la palpebroj doloris, do ŝmacis per la lipoj, inter larĝaj ridetoj.
“Trankviliĝu, mia senpacienca simio”, li ridis kaj

premis ŝian manon, dum li mienis alterne fiere kaj superŝutite.
Post bongusta manĝo, ili iris al la ĉelo de Abha. Li sidiĝis, indikis ke ŝi faru same; poste li ekparolis.
“Kara, en la kafeterio, kiam vi serĉis buŝtukon, ĉu vi memoras? Ne trovanta tukon, vi diris, “Vidu, *lak*tukon!” kaj vi sekve viŝis purige la buŝon per peco da laktuko...kara, estas facile konstati, ke vi asociiĝis kun Zoe lastajn tagojn. Vi kondutas kiel ŝi.”
Elena dankis lin pro la komplimento.
“Kara, mi estas serioza. Ekzistas etiketo por apartigi nin de la bestoj. Sen tiuj formalaĵoj, ni falas en brutecon. Mi vidas tiun brutecon nun, pli kaj pli ofte en la mondo. Mi timas. Mi timas la estonton de nia mondo, ĉar anarkiaj tendencoj minacas la etan kvanton da progreso kiun faris la malmultaj helpantoj al ordo. Ĉu vi scias kio okazis antaŭ tagoj? Pro manko de registaro, nia infrastrukturo ne ricevas riparojn. Ponto kolapsis. Kolapsis, Elena, ĉar neniu riparis ĝin. Buso plena de homoj kraŝis sur la suban vojon. Ĉiuj tiuj homoj mortis.”
“Abha!” Elena balbutis. “Mi ne scias kion diri pri la laktuko. La fakto ke vi ligas tion al la pigreco de via komunumo...”
Abha interrompis, “Mallaboremeco! Ni bezonas regulojn! Sen leĝoj, neniu laboras por la komuna bono. Diru al mi, se vi povas, ke la situacio en via spaco estas pli esperplena. Vi jam rakontis al mi, ke la konsilio en tiu spaco estas tre malforta.”
“Se mi povas forgesi pri **laktuko**, mi diros al vi!

Nekredeble, ke vi...jes, jes, kunlaboro okazas! Nur antaŭ tri monatoj, mi helpis rekonstrui parton de trotuaro. Tio estis mia kontribuo por mia teamo. Ne nur mi, ĉiu membro de la teamo restas ĝisdata en laborkontribuoj."
Elena elspiris laŭte dum ŝi memoris tiun laboron dorsrompigan.
"Kara mia! Ĉu vi aŭdas vin? Pensu pri kion vi ĵus diris. Antaŭ tri monatoj, vi helpis rilate *parton* de trotuaro kaj vi ankoraŭ restas ĝisdata! Pensu. Ĉu la infrastrukturo de tiu regiono restos ĝisdata per tiu nivelo de prizorgo?" La okuloj de Abha ŝajnis bruligi ŝian vizaĝon.
Elena gratis vangon. Ŝi provis kalkuli la kombinitan laboron de ĉiu en la komunumo. La cerbo ne volis rapide doni respondon. Ŝi provis kalkuli la nombrojn da kadukiĝintaj aferoj kiujn ŝi rimarkis lastatempe. Sed kiel scii pri pontoj? Ŝi mense notis priserĉi proksimajn pontojn por fendoj post la reveno al tiu spaco. Fakte...
Elena sendis prian peton al membro de la konsilio. Abha silente rigardis dume.
"Bone, Abha. Eble ni devus organizi nin pli. Eble nia konsilio ne estas sufiĉe trudiĝema pri projektoj. Eble ni simplaj anoj ne estas sufiĉe scivolaj pri la raportoj de inĝenieroj. Mi ne memoras ke mi mem iam legis tian raporton. Mi supozas, ke en la pasinto kiam ĉiuj estis devigitaj pagi multajn impostojn, la trafikvojoj, ne nur la Reto, restis en bona stato."
Abha ridetis kaj metis brakon ĉirkaŭ Elena. "La

hodiaŭa Reto estas plia problemo. Nuntempe, ĝi implikas ĉiun al vivado en senkorpaj lokoj, do ĉiu forgesas flegi la korpospacon."
Elena kaptis la ŝancon. "Ni komencu flegi nian korpospacon! Montru al flegistino Elena vian korpan spacon..."
Sekvamatene, ili matenmanĝis en la sama kafeterio, surprize por Elena. Ŝi kredis Abha tro embarasita por reveni. La guston de milio Elena aprezis, sed silente. Ŝi hastis fini la manĝon samtempe kiel Abha kaj sekvis lin al la strato.
Post vizitoj al antikvaj konstruaĵoj, Elena komprenis plian kialon por la deziro de Abha leĝigi devigan komunuman laboron. Ŝi eĉ ne kapablis imagi tiel for en la pasinton. Tamen, la konstruaĵoj staris kiel ekspozicio de fremda pensmaniero, fremdaj ideoj pri arkitekturo, pri belo, pri dioj.
Ŝi demandis ĉu Abha helpas prizorgi tiujn antikvaĵojn. Li paŭzis momenton kaj respondis, "Ĉu vi legis tiujn broŝurojn de SCIU?"
"Ummmm...de kiu?"
"StudCentro pri la Idearo de Unuiĝo. Mi sendis broŝurojn al vi."
"Ho jes. Mi foliumis. Tutmonda unuiĝo ne eblas. Nu, nur en la Reto."
"Eble *pro* la Reto, tutmonda unuiĝo eblas", Abha rebatis. "Kelkaj personoj eĉ ne rimarkos, ha ha! Tiuj, kiuj vivas nur por ludi rimarkos nenion. Aliaj estos indiferentaj, tiel longe kiel la Reto ne estos interrompita."

“Ho, do vi kredas, ke se ĉiuj kondutus kiel mia frato, kiu staras antaŭ murekrano la tutan tagon por partopreni ludon, neniu protestus politikan renverson.”

Fino de la unua sekcio, do Intermezo!

Karno kun ekrano ene.
Niaj nervoj pulsigas komputilojn.
"Ĉiu mortas," diras vermoj,
kiuj konas la fonton de la tero.
Sed plasto puŝas teron for.

Pluroble voĉa estas mi,
kredas mia dorlotbesto!
Soleco emeritiĝas
en nia parolepoko,
kiam haŭto telefonas!

Voĉoj el la haŭt-ekranoj:
Monda menso formorton verman vidas.
"Ni ne mortos," diras homoj
kiuj konas la nur karbonan fonton.
Humano puŝas homon for.

De posthomo ĝis humano
kiu ne bezonos teron.

Glosaro

- Spactubo: trako aŭ *relo en la ĉielo,* ĝis 140 km super la grundo, por lanĉi spacaviojn. La tuta horizontala distanco eble kovras 175 km sur la maro.
- Spacavio, tubavio: la veturilo uzita kombine kun la spactubo. La veturilo flugas sendepende post ĵeto al la supra atmosfero.
- Tubtrajno: rapidtrajno veturanta en vakigita tubo.
- Tatuaĵo: popola nomo por blato, kun aŭ sen interfaco, enkorpigita en aŭ sur la haŭton.
- Brakekrano: nur unu el la eblaj spacoj sur la korpo por meti interfacon. Perpensa regado de la kursoro estas iom malfacila por multaj, do la alternativa metodo, gestoj super la ekrano, estas pli ofta metodo. Tuŝoj sur la ekranon sendas '*tuŝon*', per la kopiado kaj sendo de la rezultaj vibroj en la ekrano estigitaj de la tuŝoj.
- Diversaj tatu-tuŝoj: glatumo, puŝeto, varmtuŝo (vibriĝo kun varmo), premo, frapo. Du frapetoj = la salutfrazoj *bonan tagon/saluton/ĝis*. Longa premo aŭ varmtuŝo = brakumo.
- SAVo: Senpilota Aera Veturilo. Iom sarkasma akronimo.
- Bitmono: elektronika mono, malcentra ĉar posedita de neniu regno.
- Loko: inkluzivas ĉian intensigitan realon.

Konfuzo estiĝas kiam uzita por la fizika komunumo/terregiono.

- Animkunulo: karesvorto por koramik(in)o, kiu ĉiam estas 'kun' vi, danke al teĥnologio.
- Ŝli: populara seksneŭtrala pronomo.
- Spaco: rilatas al nur fizika spaco.
- Korpospaco: la situo de la korpo en fizika spaco.
- Aktuali (ntr): partopreni en kuranta dissendaĵo.
- Bazlernejo: deviga por infanoj inter la aĝoj de 5 ĝis 10 jaroj. Ĉiutagaj kunsidoj okazas en ĉiu tago de la semajno.
- Mezlernejo/lernado: fizika lernejo kunsidas unu fojon semajne.
- Universitato: mikso de spacaj kaj lokaj kunsidoj.
- Kevlaro: http://eo.wikipedia.org/wiki/Kevlaro.
- Memŝargo: ŝargo de akumulatoroj por persona uzo.
- Paŝenergio: firmao kiu fabrikas plandumojn.
- Taminia Koopera Socio: produktas 'akumulatoran' sprajon kiu igas diversajn surfacojn akumulatoroj. Produktas sunpanelojn por esti uzitaj kune (la suno reŝargas la akumulatorojn). Produktas kulturajn artefaktojn.
- StudCentro pri la Idearo de Unuiĝo; SCIU:

Nomo de la aspira oligarkio.

Jam arkaikaj

Specialaj vortoj por nur-retaj rilatoj estis elpensitaj, sed la uzado jam velkis. En la tempo de *Tuboj*, normaleco = konstanta enreteco; do ekzemple, kontakto kun fremduloj okazas nature kaj estas konsiderita parto de normala vivo.

- Retamiko ⟶ amiko.
- Retlernado ⟶ lernado.
- Retejo ⟶ loko.
- Virtuala spaco ⟶ loko.
- Telefoni ⟶ paroli.
- Televido ⟶ neniu speciala vorto. Vi spektas filmon aŭ aktualaĵon.
- Virtuala realo ⟶ intensigita realo, loka realo [hodiaŭ, la termino '*loka*' signifas proksimume la malon].

Lingvaĵoj

- Pli mallongaj radikoj vidas pli oftan uzon:
  - *aviad/* ⟶ *avi/*

    - *kooperativ/ ⟶ kooper/*

- La vorto '*vi*' estas uzata multe pli ofte ol '*oni*', ĉar ĉiu estas eventuala konato. Homoj kutimiĝis alparoli iun ajn. La lingvaĵo estas pli persona, se ne familiara.
- Okazas ĝenerala ekuzo de la vorto '*ni*' en okazoj tradicie rezervitaj por la vorto '*aliaj*'.
- *'Korpospaco'* estas nova termino: tie, kie estas via korpo, restoracioj, dormolito, ks, estas korpospaco. Kelkfoje, nur la vorto '*spaco*' estas uzata por signifi la ĉirkaŭan medion; kelkfoje 'korpe': "*Kie estas vi, korpe?*" Neniam nur '*Kie estas vi?*' koncerne la korpan geo-spacon. Ankaŭ en la vortoj *spactubo*, *spacveturi*....'*spaco*' estas vorto fizika. '*Loko*' estas vorto por intensigita realo kaj virtuala ĉeesto.
- Multaj, inkluzive la partianojn por tutmonda unuiĝo, uzas la vorton 'ni' en la kutima kunteksto de 'mi / aliaj'. ('*Mi ĉeestas*' ⟶ '*Ni kunestas*'.)

Fontoj de ideoj

Spactubo: http://www.spacecable.org.uk/Technology.html kaj www.spacecable.org/Stability%20JBIS.pdf

Ŝargiloj:

http://www.stuff.tv/leading-charge-how-step-charging-shoes-and-spray-batteries-will-change-way-we-power/feature.

Flekseblaj ekranoj:
http://www.oled-info.com/flexible-oled

Tatuaĵoj:
http://www.itproportal.com/2013/11/11/motorola-patents-microphone-throat-tattoo/